


NORD GAZETO



Dumonata bulteno de la NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Fondita en 1908 n-roj 4-5/321
Julio-aŭgusto, sept. oktobro 1988

JUBILEA KONGRESO EN LIEVIN

Redaktoro kaj responda
eldonanto:

S-ro Lucien BOURGOIS
29, rue Gambetta
62950 Noyelles-Godault
(tél: 21.20.23.32)

Tarifo de kotizoj:

55FF: aktivaj membroj
42FF: membro-abonanto
35FF: junuloj kaj
pensiuloj

pagendaj al:
Fédération Espérantiste
du Nord de la France.
29, rue Gambetta
62950 Noyelles-Godault.

Per poŝta ĉeko:
Lille 517-15 G en la
nomo de la federacio
sendenda al la poŝta
centro, aŭ per banka
ĉeko, en la nomo de la
federacio, sendenda
rekte al la kasisto:
S-ro Fernand DITACROUVE
B.P. 12
24430 Hazac-sur-l'Isle

Sekretario:
S-ro Robert LEFEBVRE
1, rue César Willefert
62110 Hénil Beaumont
(tél: 21.20.37.75)

La Nordfranca Esperanto-Federacio elkore
invitas vin honori per ĉeesto ĝian okdek-
jaran jubileon, kiu okazos en Liévin (apud
Lens), Pas-de-Calais, dimanĉe 23-an de okto-
bro 1988, laŭ la jena grava programo :

- 9.15 : rendezuo en "Centre Culturel et
Social", Z.A.C. "Les Marichelles"
- 9.30 - 11.00 laborkunsido
- 11.30 : oficiala inaŭguro de "rue de l'Espér-
anto".
- 12.30 : honorvino
- 14.00 : tagmanĝo en memserva restoracio FLUNCH
(tuj apud la kongresejo)
- 15.30 + 19.00 : mini-festivalo de la Esper-
anta kulturo. Partoprenos :
 - NIKOLIN, la konata belga kantistino
 - Daniel LUEZ, kabareda kanzonisto,
 - Hervé GONIN, gitaristo

Dum la tuta semajno, impona ekspozicio
pri Esperanto.

venu multnombre kun viaj konatoj kaj
familianoj !

Anticipe dankas la federacia estraro.

(daŭrigota ĉe paĝo 4)

Mondonacoj por la PROPAGANDFONDUSO estas dankeme akceptataj...

Ni bonvenigas la jenajn novajn membrojn :

S-ino BIELA J., 12/2 Impasse Delecroix, 159 rue du Fg de Roubaix
59800 LILLE

S-ro LANSIAUX Jean, 3F rue 16e § 22e Dragons, 51100 REIMS

S-ro PLOUY Jean, B.P. 30, 59007 LILLE CEDEX

PRI NIAJ GEAMIKOJ

Ges-roj DITACROUTE, GILOTEAUX kaj LEGROS, S-ino LINÉ kaj S-ro
COUSSEMACQ ĉeestis la nacian kongreson de U.F.E. en Rouen .
P.BOURDON celebris la diservon kaj eldiris la pentekostan predikon.

Ges-roj GILOTEAUX kaj LEGROS, S-roj COUSSEMACQ kaj DIETRICH,
S-ino LINÉ, F-inoj SUEUR kaj VANWALLEGHEM ĉeestis la universalan kongre-
son de Esperanto en Roterdamo. P.BOURDON kuncelebris ekumenan diservon.

S-ro DIETRICH deĵoris en Bouresse. S-ro J.BERTRAND partoprenis la
staĝon en "Kvinpetalo".

Okaze de vojaĝo al Japanio, S-ro J.BERTRAND renkontis esperantistojn
de la klubo de Uzi, apud Kioto. Poste, la klubo gazeto "la Verda Teo"
aperigis paĝon da aŭtografaj ricevitaj dum la kunveno.

Belgaj rendevuoj : en la urbo Kortrijk (Courtrai), kvar membroj de
la klubo "Lille-Esperanto" plurfoje vizitis la Esperanto-kursejon kaj
la komunuman bibliotekon kun la grava fako (libroj/gazetoj) pri la
internacia lingvo. Krome, Francoj ĉeestis ankaŭ debaton pri Esperanto-
instruado kun la usona fakulo D. KEEFE.

Ĉismere, P. Louis BOURDON partoprenis staĝon en la ekologia centro
"MONDHEJMO" de Cauduro (Langvedoko), kiun animas Nicole PAIROUX.

Reveninte el Rouen, Fernand DITACROUTE aperigis artikolon en la loka
gazetaro. Sekve, li ricevis plurajn telefonajn alvokojn de personoj,
kiuj deziras lerni Esperanton. Li intencas malfermi kurson ĉiaŭtune.
Aliflanke, la urbestro-senatano de Razac proponis al li rendevui fine
de aŭgusto kun lernejinspektoro por enkonduki la Esperanto-instrua-
don en la lernejon. Ni deziras al li sukceson en liaj klopodoj.

La migrema cikloturisto JORGOS, kiu lastjare vizitis nian regionon,
estis oficiale akceptita de S-ro Pascal TOTI, urba konsilanto de
Fréjus, kun kelkaj samteamanoj, el kiuj du Nordeŭropaninoj, revene de
la Roterdama kongreso.

NI GRATULAS

La literatura revuo "FONTO", eldonata en Brazilo, anoncas ke Daniel
LUEZ, el Laon, iĝis ĝia ĉefredaktoro.

Lastjulie, Jean BERTRAND sukcese trapasis la skriban parton de
"Atesto pri Kapableco".

La 10-an de januaro 1988, la urbestro de Le Perreux sur Marne dona-
cis al S-ro Roger DESPINEY la arĝentan medalon de tiu urbo, omaĝe al
liaj laboroj por Esperanto, ne nur en Le Perreux, sed ankaŭ naciskale,
ĉe la sidejo de U.F.E.

Lilli GILOTEAUX publikigis poem-kolekton en Esperanto, kun desegnoj,
sub la titolo "Kalejdoskopoj" (20 FF, CCP LILLE 2269 89 X al la ordono
de : M-me GILOTEAUX). Ĝi estos ankaŭ aĉetebla okaze de la federacia
kongreso.

La 31-an de aŭgusto, kadre de la Esperanto-leciono ĉe "France-Inter",
la franca radiostacio disaŭdigis la kanton de NIKOLIN' "Iomete da,
multe da".

PRI NIAJ GEAMIKOJ (Daŭrigo)

F-ino Georgette PREUX partoprenis la 7-an Sejnan rendezuon en Mesnil S- Père. Ŝi kaj P. Louis BOURDON partoprenis la kongreson kaj internacian pilgrimadon de la Franca Katolika Esperanto-Asocio en Lourdes.

En aŭgusto, Bertrand CARETTE, el Roubaix, sukcesis la unuagradan E-ekzamenon kun cito "Tre bone".

La 27-an de novembro, P. BOURDON festos siajn 60 jarojn da religia vivo. Fakte, li eldiris siajn unuajn votojn en 1928 ...

Gratulojn al P. BOURDON kaj ankaŭ al Bertrand CARETTE!

P. BOURDON kaj F-ino PREUX partoprenis la 12-an Pilgrimadon en Banneux. Tie, ĉiuj bone akceptas la esperantistojn, ankaŭ la ekleziaulojn. Kun granda afableco, la kapelestro diris : "Ĝis la venonta jaro!"

NIA VIVO

En Lille kaj Valenciennes, la bibliaj kunvenoj okazis regule, en la jaro 1987-88. Usona esperantisto; S-ro Cornelius J. Mc KOWN, el State College, petis de P. BOURDON detalojn pri tiuj kunvenoj : Biblio kaj Ekumenismo.

Lille : dum la somerferioj, F-ino BOUTRY kaj S-ro PLOUY anoncis iniciadon al Esperanto, titolitan "Plaisirs de Vacances", per afiŝetoj en la Kvartala Domo de "St Maurice des Champs". En julio, enskribiĝis 16. 10 regule frekventis la kurson dum la tuta monato. En aŭgusto, ĉar plej multaj forveturis, restis du gelernantoj. La duhora kurso okazis po tri fojojn semajne.

En la sama loko okazis ekspozicio; de la 9-a ĝis la 11-a de septembro, kiun anoncis cent afiŝoj kaj la nordfranca gazetararo. Vizitis ĝin 125 personoj. Krom provleciono, la vizitantoj povis aŭskulti kasedojn, konsulti multajn librojn kaj dokumentojn, ricevi Esperanto-revuon. Malfermiĝos E-kurso, la 5-an de oktobro.

S-ro PLOUY malfermis ĉiusabatan kurson ĉe U.F.J. (Union Française de la Jeunesse).

Poemo eltirita el "KALEJDOSKOPE" (verkis Lilli GILOTEAUX)

Prezentado de arta glitkurado

Lumo invite
falas subite
super glacia pavim'.
Por la prezento
glitas al centro
bela sportema knabin'.

Vigle sin svinge
ŝi rapidklinge
dancas laŭ ritma muzik'.
Ŝi arabeskas
ĉarme mangestas
al simpatia publik'.

Nun ŝi delire
glitas rondire
kiel vivanta turbin',
kapo klinita,
retrofleksita.
Ravas nin tiu knabin'.

Jen spirohalte
ŝi supersalte
jetas sin supren kun ĝoj',
kaj senhezite
ligas sin glite
movoj en flua glitvojs'.

Ŝi sin balancas,
senpeze dancas,
kiel fabela fein'.
Birdosimile
flugas jubile
glita girlando ĝis fin'.

LA GAZETARO. KAJ NI

"Le Prix Zamenhof au Directeur de U N I C E F" (Departementa bulteno de la Nacia Sindikato Geinstruista en Pas-de-Calais", n-ro 222 (marto 88) - Chronique espérantiste.

"Un séminaire pour la paix ouvre une ère nouvelle pour la diffusion de l'espéranto (sama bulteno kiel ĉi-supre, n-ro 223 (junio 88).

"Les Causses/Cubjac : Portes ouvertes au camping" : artikolo kaj tri fotoj, i.a. tiu de la paŝponteto "Esperanto", inaŭgurita tiuokaze ("Sud-Ouest", 10-5-88).

"Le Petit Roi" ou "La Reĝeto", de MARKOS (artikoleto pri la dudirekta (franca-Esperanta) verko de Marc LOUSTE en "Vivre au Présent" n-ro 14 (aprile 88).

"Des Nordistes au congrès d'espéranto de Rotterdam" (Nord-Eclair, 22-7-88).

"Née dans un café de Lille, le 23 juillet 1888 - L'Inter bientôt centenaire" (Nord-Matin, 22-7-88). Temas pri la revolucia kanto "La Internacia", kies franclingvaj paroloj estis verkitaj de Eugeno POTTIER. Gustavo DELORY, estonta urbestro de Lille, rimarkis la tekston kaj konfidis ĝin al sampartiano, Petro DEGEYTER, kiu komponis la arion. Kiel precizigas la artikolo, ĝi estis poste tradukita en aliajn lingvojn, inkluzive Esperanton.

En la gazeto "Le Soir" (Belgio) franca korespondanto starigis alia legantoj du demandojn rilate la unuan Esperanto-grupon kaj la unuan poliglotan klubon en Belgio. Trafe respondis G.PIRLOT, el Ostendo.

Artikolo pri Esperanto aperis lastan union en reklam-gazeto de la kongresa urbo Rotterdamo (Nederlando).

En sia aŭtuna numero, la informilo de la filatela asocio en Wattrelos (Francio) dediĉas plurpaĝan artikolon al Esperanto sur poŝtmarkoj. Laŭ la reagoj sekvas - aŭ ne - apero de mallonga filatela terminaro (Franca-Esperanta).

Artikolo pri D-ro ZAMENHOF aperis en la unua numero de la revuo "Profil/Vlan Magazine" (V.KIRSZBAUM, brusela eldono, 420.000 ekz.).

"Le Républicain Lorrain" (22-8-88) aperigis artikolon pri la Esperanto-kurso de "France-Inter".

"L'espéranto, une solution au chaos linguistique" (kun foto) en La Voix du Nord - "Journal de Lille", 11-12/9/88 .

"Zamenhof dans l'espace" ("Timbroscopie", sept. 88)


FEDERACIA KONGRESO (Daŭrigo)

Renovigo de triono de la federacia konsilio :

Finiĝis la mandatoj de S-ino LINÉ Marie-Jeanne, S-roj DIETRICH Jean, DITACROUTE Fernand, LÉFEBVRE Robert kaj VILHELM François. Ĉi tiuj personoj bonvolu sciigi, ĉu aŭ ne ili deziras ree kandidatiĝi. Eventualaj kandidatoj sin anoncu al S-ro BOURGOIS. Notinde, ke ne funkcias reprezentanto de JEFO.

Agadraportoj : la klub- aŭ grup-gvidantoj verku raporton pri la aktivajoj de sia asocio kaj bonvolu prezenti ĝin dum la ĝenerala kunveno. Se vi ne povos ĉeesti, bonvolu sendi ĝin al Lucien BOURGOIS.

PLAN D'ACCES DU CENTRE CULTUREL ET SOCIAL JULES GRARE



VENANT DE METRUC-CALAIS

VENANT DE LENS-LILLE
AUTOROUTE A 1

SORTIES
DIRECTION
LIEVIN

BOULEVARD MINIERE

Z.R.C. LES MARCHELLES

ZONE
INDUSTRIELLE

Rue de l'Espérance
ROND POINT
CH. DE GAULLE

SORTIE
LIEVIN SUD:
HOTEL DE VILLE

A PARTIR DU ROND POINT
CHARLES DE GAULLE,
SUIVRE LE TRACE NOIR

AUTOROUTE A 1
VENANT DE PARIS, S'ARRÊTER A ANGRES, SUIVRE L'AVENUE DE LA REPUBLIQUE

CITE COLLEMEUVET

FLUNCH

DEFERNEZ

GYMNASSE
RIAUMONT

ANGRES

PARC DE
COLLEMEUVET
GYMNASSE
DESCHAMPES
STADE
COUVERT

MALLÉ DES
SPORTS

HOTEL DE
VILLE

JARDIN PUBLIC

VENANT DE
SOUCHEZ

ARRAS

← VENANT LENS
LILLE

Kongressjo
C.C.S.

RADIO KAJ TELEVIDO

La 16-an de januaro, je horo 13.30, aŭdiĝis la elsendo de "France Inter" Téléscopage, de Philippe MEYER. Oni sciigis, ke Henri MASSON menciis la Esperantan tradukon de kanzono de Georges BRASSENS. Kvin semajnojn poste, en la sama elsendo, ni aŭdis la esperantlingvan version de "l'Auvergnat", esperantigitan de Roger BERNARD, sub titolo "La Kampulo", kaj kantitan de Olivier TZAUT.

La 1-an de junio, "France Inter", elsendo 15-115, intervjuis dum unu horo Henri MASSON pri Esperanto.

Grava sukceso : de la 1-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro, de lundo ĝis sabato, "France Inter" disaŭdiĝis 5-minutan Esperanto-lecionon en elsendo de Brigitte VINCENT, iniciate de SAT-Amikaro. Instruis Anglo, Richard Comerford. Pli ol 6.000 korespondaĵoj trafis la radiostacian redakcion!

La 21-an de junio, ĉe la unuaknala televida stacio T F 1, oni parolis pri D-ro ZAMENHOF kaj Esperanto, kaj anoncis la eldonon de poŝtmarko.

Radio-elsendo en Havano : ĉiusemajna Esperanta radioelsendo okazas en Radio Ciudad de la Habana. Post Rio de Janeiro kaj Sorokaba, ĝi estas la 3-a regula elsendo en Latinameriko.

Radio Rejkjavik : ĉiusemajne, po unu kaj duonan horon, la islanda radiostacio elsendas en Esperanto.

Esperanto ĉe radiostacio en G.D.R. : kadre de la elsendo "Tempo por la oreloj", de Radio DDR 1, gastis D-ro Detlev BLANKE. La programo, kiu okazis la 17-an de oktobro 1987, donis multajn interesajn informojn pri-esperantajn.

30 minutoj en radio : la 29-an de februaro, la radiostacio "Sender Leipzig" elsendis 30-minutan intervjuon kun du esperantistoj : Sabine SCHULZE, prezidantino de la Distrikta Estraro de GDREA, kaj Joachim SCHULZE, prezidanto de la Centra Estraro de GDREA.

Parolas Radio-Zagreb, de 35 jaroj (art. en "HEROLDO" (n-ro 1796) .

Antaŭnelonge, brita televido (BBC 2) prezentis sciencfikcian serion titolitan "Red Dwarf" (ruĝa nano). En pluraj epizodoj okazis konversacioj pri studado de Esperanto kaj vidiĝis indikiloj "Level/Nivelo 1", "Cinema/Kinejo".

ESPERANTO-INSTRUADO

Nova leĝpropono : leĝpropono celanta enkonduki Esperanton kiel elektable lingvo en la lernejan kaj universitan programojn estis deponita de S-ro Jean ROATTA, U.D.F. (centristo), deputito en Bouches-du-Rhône kaj registrita, la 24-an de februaro 88, ĉe la prezidantejo de la Nacia Asembleo, sub n-ro 1246. Ĝi entenas mallongan priskribon de la motivoj kaj ununuran artiklon :

"Esperanto estas agnoskata kiel elektable lingvo ĉe ĉiuj niveloj de la duagrada kaj supra instruado."

Nova paŝo por la enkonduko de Esperanto en lernejojn :

Antaŭ kvar jaroj, nome : la 19-6-84, kreiĝis en Vitry/Seine Esperanto-Asocio, kiu prezidas Marc LOUSTE. Ĝi celis agadi en la diversaj lernejoj kaj - sekve - proponis pedagogian projekton al la akademio Val de Marne, kiu apogis ĝin.

Januare 87, komenciĝis agado en la bublernejo, kiu estras S-ino MARTIN; La estrino de la unuagrada lernejo; S-ino E. COTTON, konsentis krei lern-atelieron. Ankaŭ alia malfermiĝis en la bublernejo C. Perrault. En la liceo Jean Macé estis enkondukataj 5 paĝoj pri E° en minitelon.

L. GILOTEAUX : VOJAĜNOTOJ EL GERMANIO

En Bonn, funkcias Germana Esperanto-Centro, kiun gvidas Claudia HAMELBECK, kun malgranda grupo da kunlaborantoj (G.E.C., Eifelstrasse 9, D-5300 Bonn).

Dum debato pri Esperanto - aranĝita en la angla-germana klubo de Düsseldorf, Klaus EICHHORST paroladis kaj respondis al multaj demandoj de 29 interesatoj.

Jam de 25 jaroj disvolviĝas ĝemel-rilatoj inter la Esperanto-rondoj de Gray kaj Oberkirch, en Nigra Arbaro (FR Germanio). Post sonbenda korespondado, nun regule okazas reciprokaj vizitoj. Jen aranĝo simila al la pentekostaj renkontiĝoj de Valenciennes-Düren.

Kadre de kunveno de Bavara Esperanto-Ligo, la Esperanto-grupo de Nurenbergo festos, fine de oktobro, sian centjaran fondiĝ-jubileon. Fakte, temas pri la unua Esperanto-klubo en la mondo. Menciindas, ke ankaŭ en Nurenbergo aperis la unua Esperanto-gazeto, jam en la jaro 1889. Festo-tagoj : la 21-an, 22-an kaj 23-an de oktobro 1988. Inf. : B.E.L., Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg .

Dum somero, studentino - Cornelia STAGMANN - vojaĝis per la "Pasporta Servo" kaj vizitis Esperanto-amikojn en Nederlando, Belgio, Italio kaj Francio (Parizo, Lille, Roubaix). Estis okazoj por babili pri intensivaj kursoj (Berlino/La Chaux-de-Fonds) junularaj renkontiĝoj (Bad Mündler kaj Rastatt, de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto, pri naciismo kaj internaciismo en Eŭropo).

En sinsekvaj numeroj de la revuo "Esperanto aktuell", Stefan MAUL, redaktoro de "Monato", pritraktas la temon "Falsaj Amikoj", ĉefe por germanlingvaj novaj esperantistoj. Por franclingvanoj, simila listo eldoniĝis sub titolo "falsaj amikoj en Esperanto". Kunverkis ĝin : R. BERNARD kaj A. RIBOT.

Post raporto pri la membroj de Germana Esperanto-Asocio (ĉ. 1.300), D-ro Rudolf FISCHER skribas (EA n-ro 5/87) : "La Esperanto-movado ne povas iĝi amasa movado, ĉar la postulo lerni Esperanton ĝis flua parolado rimarkeble superas la nivelon de la plejmulto ... Ni bezonas ankoraŭ pli de regionaj aranĝoj, kunlabore kun la najbaraj Esperanto-Asocioj trans la limoj, kaj multe pli da intensaj semajnfinoj. "

Jam aperis, en Belgio, la 7-a eldono de la "Oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo" (120 BF aŭ 5 internaciaj respond-kuponoj, ĉe la kompilinto : G. PIRLOT, Kemmelbergstraat 5, b. 3, B-8400 Oostende, pĉk. 000 - 0259390 - 12).

Filatelato : nova poŝtmarko kun teksto en Esperanto estis disvendita okaze de la tutmonda filatela ekspozicio "Praga 88" (26-a de aŭgusto ĝis 4-a de septembro).

Kolektado : la "Libro de Rekordoj" (nederlanda eldono) citas kolektanton, kiu arigis 1.364 vinjetojn, 947 poŝtkartojn kaj 647 stampojn ekskluzive dediĉitaj al Esperanto.

Ĝemeliĝo : en la edziĝ-salono de la urbodomo de Besançon, la grupo Besançon-Esperanto kaj la Esperanto-grupo de Freiburg subskribis ĝemel-ĉarton.

Nova prezidanto : Jean-François BLIN, el Auxerre, anstataŭis S-inon TURIN kiel prezidanto de la federacio Bourgogne - Franche-Comté - Aube. Ni gratulas!

Ni renkontis kurs-gvidanton,
kiu neniam perdis lernantojn ...

=====

Ĉu eblas instrui la internacian lingvon kaj kapti la atenton de la lernantoj ĝis la lasta leciono ? - jes, certe jes, respondas nia amiko Petro, kiu spertis tion jam pli ol 20 fojojn.

En diversaj belgaj rondoj (Loveno, Aalst, Antverpeno ...), li sukcese instruis Esperanton, surbaze de la jenaj lernolibroj :

- La 14-hora rapidkurso (W. AULD)

Dum du sinsekvaj tagoj, nome dufoje 7 horoj (inkluzive la finan ekzamenon), la lernantoj - plej ofte studentoj - lernas la esencon de la lingvo (ĉ. 200 radikojn). La broŝuro de W AULD enhavas vortojn kaj frazojn en Esperanto, sen klarigoj. Tamen, en ĉiu nova ĉapitro, estas nacilingva traduko de la uzotaj radikoj. Aldoniĝas la tabelo de korelativoj (tiom...kiom, tiel ...kiel...) kaj sistema uzado de la afiksoj.

Post 14 horoj, lacaj sed kontentaj estas kaj la lernantoj kaj la kursestro.

- "La Komencanto" (G.P. de BRUIJN)

Ĉijare, en la urbo Lokeren, okazis 13-semajna Esperanto-kurso (13 duhoraj lecionoj, sen paŭzo), kun 7 lernantoj, 10- ĝis 27-jaraj. Ĉiu kunsido komenciĝis kaj finiĝis tre akurate, kun gramatikaj klarigoj kaj severa kontrolo de la hejmtaskoj. La gvidanto zorgis, ke la studentoj klare sentu, ke li sin okupas pri ili individue. Por la lasta leciono, la praktika tasko estis traduko, sen vortaro, de artikolo el flandra ĵurnalo (la parolado de la reĝino, okaze de ŝia 60-jariĝo).

En ĉiu el la 20 kursoj (laŭ raporto de la gvidanto Petro de SMET), la nombro de la lernantoj ĉe la fino superas - aŭ minimume egalas - la nombron ĉe la komencaj lecionoj . (LGx)

RADIO-ELSENDOJ EN ESPERANTO

(aŭdeblaj en Francio . Vintra hortempo)

Ĉiutage

6.30 - 7.00 Varsovio 200 m (1503 kHz). 50.04 m (5995 kHz)
48.90 (6135 kHz). 41.27 m (7270 kHz)
12.00 - 12.45 Varsovio 41.99 m (7145 kHz). 31.50 m (9525 kHz)
16.30 - 16.55 Varsovio 49.22 m (6095 kHz). 41.18 m (7285 kHz)
17.30 - 17.55 Varsovio " " " "
20.30 - 21.00 Varsovio 49.22 m (6095 kHz)
21.00 - 21.30 Pekino 40.16 m (7470 kHz). 32.03 m (9365 kHz)
22.30 - 22.55 Varsovio 30.10 m (9965 kHz). 50.04 m (5995 kHz)
200 m (1503 kHz). 49.22 m (6095 kHz). 41.18 m (7285 kHz)

lunde

18.30 - 18.40 Berno 75.28 m (3985 kHz). 48.66 m (6165 kHz).
31.46 m (9535 kHz)

Ĵaŭde

7.00 - 7.15 Vatikana Radio 186 m (1611 kHz). 48.01 m (6248 kHz)
41.38 m (7250 kHz). 30.75 m (9755 kHz)
25.61 m (11715 kHz)
18.30 - 18.40 Berno (kiel lunde)
22.20 - 22.30 Tallinn 290 m (1035 kHz). 50.63 m (5925 kHz)

sabate

18.30 - 18.40 Berno (kiel lunde)
21.00 - 21.20 Romo 41.24 m (7275 kHz). 30.90 m (9710 kHz)
25.42 m (11800 kHz)

dimanĉe

9.30 - 9.55 Vieno 48.74 m (6155 kHz). 25.18 m (11915 kHz)
10.25 - 10.30 Tallinn (kiel ĵaŭde)
20.30 - 21.55 Vieno 50.46 m (59.45 kHz). 48.74 m (6155 kHz)
21.00 - 21.10 Vatikana Radio 570 m (526 kHz). 196 m (1530 kHz)
48.74 m (6190 kHz). 48.01 m (6248 kHz)
41.38 m (7250 kHz). 31.10 m (9645 kHz)
(ankaŭ feritage)
22.45 - 23.00 Zagreb 262 m (1143 kHz)

Jen la adresoj de la radiostacioj :

Radio Polonia. Esperanto-redakcio, Pk 46, PL-00-950 WARSZAWA, Pollando
Radio Pekino. Esperanto-fako. BEIJING, Popola Respubliko Ĉinio
Radiovaticana Esperanto-fako. Piazza Pia 3, I-00193 ROMA, Italio
Svisa Radio Internacia. Esperanto-fako, CH-3000 BERN 15, Svislando
Radio Aŭstrio Internacia. Esperanto-fako. A-1136 WIEN, Aŭstrio
Radio Roma. Esperanto-fako. C.P. 320 Centro Corrisp. I-00100 ROMA, Italio
Eesti Raadio. Esperanto-fako, SU-200100 TALLINN, Estonio, Sovetunio
Radio Zagreb. Esperanto-fako. YU-44000 ZAGREB, Jugoslavio

Le gérant resp. : Lucien BOURGOIS, 29 rue Gambetta, F 62950 Noyelles-Gt